**Karaj kamaradoj,**

Ni invitas vin – organizaĵojn kaj individuojn – subskribi la deklaracion ***"Ukrainio: Popola paco, ne imperia paco"***, kiun ni prezentas al vi kun ĉi tiu letero kaj la ĉi-suba dokumento.

La venontaj monatoj estos tre malfacilaj por la ukraina rezisto kontraŭ la rusaj okupaciaj fortoj. En kunordigo kun la ukraina registaro, la svisa registaro organizos internacian packonferencon apud Lucerno dum junio 15/16.

Ni kredas, ke ĉi tiu packonferenco estas grava okazo por levi la konscion pri la memdefenda lukto de la ukraina popolo kontraŭ la rusa okupacio el laborista perspektivo. Jen kial ni volas kontraŭstari la ambiciojn de la oficiala packonferenco per internaciisma perspektivo bazita sur solidareco kaj orientita al radikala socia kaj ekologia transformiĝo ĉie en Eŭropo. Ni kune staras por ukraina memdetermino kaj favore al la demokratia renverso de la Putin-reĝimo.

La Bewegung für den Sozialismus / Mouvement pour le Socialisme (BFS/MPS) kaj solidaritéS – kontraŭkapitalisma, feminisma kaj ekosocialisma organizaĵo, ambaŭ en Svislando, la demokratia-socialisma neregistara organizaĵo Socialnji Ruĥ en Ukrainio, la rusa Amaskomunikila Kolektivo Posle kaj emanzipation – Zeitschrift für ökosozialistische Strategie [revuo por ekosocialisma strategio] interkonsentis lanĉi komunan deklaracion por interveni en la internaciaj debatoj pri pacperspektivoj.

**Per ĉi tiu komuna deklaracio oni intencas atingi tri celojn:**

1. Iniciati komunan procezon de kompreniĝo inter la subskribintaj organizaĵoj, iniciatoj kaj amaskomunikilaj kolektivoj pri tio, kiel ni povas kontribui al firmiĝo de la solidareco kun la ukraina rezistado.
2. Stimuli ĉioinkluzivajn diskutojn pri nacia memdetermino, interimperiisma rivalado, pensado en kategorioj de geopolitikaj blokoj, rearmado, kontraŭimperiismaj kaj ekosocialismaj strategioj kaj ĝenerale emancipaj laboristklasaj mobiliziĝoj, precipe ene de progresemaj sociaj movadoj kiel la feminisma movado, la naturmedia movado, migranto-solidareco kaj sindikatoj.
3. Iniciati dialogon inter la subskribintoj por pli multampleksa programa kaj strategia kompreno pri kontraŭkapitalisma kaj ekosocialisma transformiĝo de la tuta eŭropa kontinento en perspektivo de tutmonda solidareco.

Ni petas socialismajn, ekosocialismajn, feminismajn, ne-aŭtoritatismajn, anarkiismajn kaj radikalajn medio-organizaĵojn, iniciatojn, amaskomunikilajn kolektivojn kaj individuojn en Eŭropo kaj ekster Eŭropo subskribi ĉi tiun deklaracion ĝis la 14-a de junio kaj pli poste.

Ni provos publikigi la deklaracion kiel eble plej vaste sur la internacia ebeno.

Surbaze de la komuna deklaracio, ni volas daŭrigi kaj profundigi la diskuton inter la subskribintaj organizaĵoj, iniciatoj, amaskomunikilaj kolektivoj kaj interesitaj personoj.

Ni komencos ĉi tiun diskuton, organizante enretan konferencon la 15-an de junio. En tiu konferenco, parolantoj el la lanĉintaj organizaĵoj prezentos la ĉefan enhavon kaj la celon de ĉi tiu deklaracio kaj ankaŭ sugestos ideojn por plia politika diskutado kaj kunlaboro (pri kio pliaj informoj sekvos).

Organizaĵoj bonvolu  sendi la konfirmon de sia subskribo ĝis la 14-a de junio al Joao_Woyzeck@proton.me kaj redaktion@emanzipation.org

Individuoj bonvolu subskribi ĉi tie:
https://forms.gle/EAPYSoJCHpWq4bHR6

en solidareco,
*Joao Woyzeck por la Movado por Socialismo kaj Christian Zeller por emanzipation, 2024-06-04*

# Ukrainio: Popola paco, ne imperia paco

*Komuna deklaracio de ekosocialismaj, anarkiismaj, feminismaj, naturmediaj organizaĵoj kaj grupoj solidariĝantaj kun la ukraina rezistado kaj por memdeterminita socia kaj ekologia rekonstruo de Ukrainio*

La svisa registaro okazigos internacian konferencon por pacprocezo en Ukrainio la 15-an kaj 16-an de junio 2024 sur la monto Bürgenstock, proksima al Lucerno. La ukraina registaro subtenas tiun konferencon.

Tiu konferenco okazos en decida fazo de la milito. Dum monatoj la rusaj invadintaj fortoj batas breĉojn en la ukrainajn defendojn kaj repuŝas ilin, havante mem pezajn perdojn. La gvidantaro de Rusio anoncis grandan ofensivon kaj atakas la homojn en Ĥarkivo, urbo de hommilionoj.

Ni apogas ĉiujn paŝojn al paco, kiu ebligas al la ukraina popolo rekonstrui la landon laŭ memdeterminita maniero. Paco necesigas la kompletan retiriĝon de la rusaj okupaciaj fortoj el la tuta teritorio de Ukrainio. Kun konsidero pri tio, ni esperas, ke la packonferenco en Svisio kontribuos al la restarigo de la suvereneco de Ukrainio.

La kondiĉoj por tio estas ekstreme malfacilaj. La reprezentantoj de la Putin-reĝimo regule deklaras, ke ili ne agnoskas sendependan Ukrainion kaj neas la ekziston de la ukraina popolo. La Putin-reĝimo agas por grandrusa projekto, subjugigas la popolon en la okupaciitaj teritorioj per teroro kaj celas elradikigi la ukrainan kulturon. La reganta reĝimo en Rusio regule plenumas militkrimojn kontraŭ la loĝantaro de Ukrainio.

La plenskala rusa invado de Ukrainio lanĉita la 24an de februaro 2022 elmetas al dubo ne nur la sendependecon de Ukrainio. Ĝi ankaŭ kuraĝigas aliajn aŭtoritatismajn reĝimojn minaci najbarajn loĝantarojn, okupacii teritoriojn kaj amase forpeli homojn. Por eviti reziston hejme, la rusa armeo nun rekrutas homojn ankaŭ el najbaraj landoj kaj el la tergloba sudo por servi kiel kanonfuraĝo.

Pro la masiva – kaj surpriza – rezisto de la ukraina loĝantaro, la registaroj de Eŭropo kaj Norda Ameriko komencis subteni la ukrainan armeon en ĝia defendo kontraŭ la rusaj okupaciaj fortoj. Tamen, ili subtenas Ukrainion por aserti siajn proprajn interesojn en la tutmonda interimperiisma rivalado. La usona celo estas malfortigi sian rusian parulon, dum ĝi montras forton kontraŭ la leviĝanta Ĉinio kaj decidas la paŝrapidecon por la eŭorpaj potencoj, kiuj estas samtempe partneroj kaj rivaloj. Sed malgraŭ, ke la usona Kongreso finfine aprobis multampleksan helpopakaĵon por Ukrainio 2024-04-20, blokitan dum naŭ monatoj de la Respublikana Partio, la apogo por Ukrainio ĉiam restis selektiva kaj nesufiĉa.

Simile, la ekonomiaj sankcioj truditaj de la registaroj de EU kaj Usono kontraŭ Rusio kaj la porpledantoj de la Putin-reĝimo estas selektivaj, neadekvate celdirektataj kaj nesufiĉaj. Ili ne malhelpas al Rusio plu eksporti nafton kaj gason, kune kun aliaj strategie gravaj krudmaterialoj, por plenigi sian militkason. Kelkaj eŭropaj landoj eĉ signife kreskigis siajn LNG-importojn el Rusio ekde la komenco de la milito. Aliaj, kiel Aŭstrio, akiras pli ol 90% el siaj importoj de tergaso el Rusio. La registaroj de tiuj landoj devigas gaskonsumantojn financi la militon de Putin kontraŭ la loĝantaro de Ukrainio.

La svisa registaro, gastiganta la packonferencon, ne nur donas impostajn avantaĝojn al rusaj oligarkoj jam de jardekoj, sed ankaŭ rifuzis ekde la komenco de la plenskala rusa invado konfiski la havaĵojn de tiuj oligarkoj. Kiel granda nabo de internacia varkomercado, Svisio jam de multaj jaroj proponas al la rusa kapitalo bonegajn okazojn por akiri riĉaĵojn. Multaj burĝaj politikistoj feliĉe bonvenigis tiujn komercadojn en Svisio. Per la vendo de duuzaj produktoj, Svisio kontribuas al la ekipado de la rusia militmaŝino. Kaj fine, la svisa financa sektoro faciligas la komercadon per rusia nafto.

Kaj en Usono kaj en Eŭropo estas kreskanta nombro da voĉoj en la politika kaj ekonomia establo, kiuj volas ligi sian apogon por Ukrainio al certaj kondiĉoj. Ili celas premi Ukrainion cedi grandajn teritoriojn kaj plurajn milionojn da homoj al la Putin-reĝimo. Tia paco, kiun trudus grandaj imperiaj potencoj, fortigus la Putin-reĝimon kaj ne donus bazon por daŭronta demokratia rekonstruo de Ukrainio.

Ni bezonas pacon bazatan sur kaj ankaŭ subtenatan de la interesoj de la popolo kaj la laboristoj de Ukrainio kaj Rusio. Tia perspektivo povas sukcesi

nur, se sindikatoj, virinaj organizaĵoj, naturmediaj iniciatoj kaj diversaj organizaĵoj de la civila socio kaj el Ukrainio kaj el Rusio gvide rolos en la intertraktadoj pri paco.

Okupacio estas krimo! Nin gvidas la principoj de memliberigo, emancipiĝo kaj memdeterminado de laboristklasaj kaj ĉiuj subpremataj popoloj ekster geopolitikaj konsideroj. Tiusence ni staras ankaŭ solidare kun la palestina popolo, jam de jardekoj batalanta por sia memdetermino. Analoge, ni subtenas la kurdan kaj armenan popolojn kaj ĉiujn aliajn popolojn minacatajn de okupacio, nacia kaj kultura subpremo.

Surbaze de nia pozicio, subtenanta la ukrainan reziston kontraŭ la rusa okupacio, ni volas kontribui al evoluigo de komuna eŭropa perspektivo por radikalaj sociaj-ekonomiaj reformoj kaj finfine por ekosocialisma transformo de la tuta eŭropa kontinento en tuttera solidareco.

Eldonante ĉi tiun deklaracion por diskutado, ni volas kontribui al transnacia procezo de interkompreniĝo kaj politika klariĝo inter tiuj maldekstraj fortoj tra la tuta Eŭropo kaj ekster ĝi, kiuj kundividas ĉi tiujn gravajn konvinkojn.

## 12 principoj por justa paco en Ukrainio en Eŭropo bazota sur solidareco kaj ekologio

Ni, la subskribintaj organizaĵoj kaj iniciatoj, volas antaŭenigi pacprocezon konforman kun la ĉi-sekvaj 12 principoj.

1. Atingi socie justan kaj ekologie daŭripovan pacon postulas la senkondiĉan kaj kompletan retiriĝon de rusaj okupaciaj fortoj el Ukrainio, kio revenigos la tutan teritorion al siaj internacie agnoskataj landlimoj.

2. Rusio sisteme detruas urbojn, infrastrukturon kaj la naturan medion por demoralizi la loĝantaron kaj elvoki grandan ondon de rifuĝantoj. Kontraŭ ĉi tiu ĉiutaga teroro ni postulas, ke la "okcidentaj" registaroj subtenu Ukrainion en la protektado de siaj loĝantaro kaj infrastrukturo kontraŭ la bombaj kaj misilaj atakoj de la rusa okupacia potenco. Ni pledas por masiva homhelpa, ekonomia kaj militrilata subteno por Ukrainio el la riĉaj ŝtatoj en Eŭropo. La loĝantaro de Ukrainio urĝe bezonas protekton kontraŭ rusaj bomboj kaj misiloj.

3. Ni kontraŭas provojn de "okcidentaj" registaroj, reprezentantoj de NATO kaj EU, premi Ukrainion al plenumo de masivaj koncedoj al la rusia okupacia potenco. Ni kontraŭas la ideon, ke Ukrainio devas forcedi plurajn milionojn da homoj al la Putin-reĝimo. Estas afero nur de la ukraina popolo decidi kiel alfronti tiun ĉi militkriman situacion de daŭranta kaj eble pligrandiĝonta okupacio. Ni subtenas la armitan kaj nearmitan reziston de ukrainoj kontraŭ la rusa okupacia potenco.

4. Ni postulas, ke al ĉiuj rusoj, kiuj rifuzas la militservon, oni donu sekuran loĝstatuson en la landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko. Amasa dizertado gravas por malfortigi la rusan militmaŝinon.

5. Ni subtenas la politikan lukton de ukrainaj sindikatoj, virinaj organizaĵoj kaj naturmediaj iniciatoj kontraŭ la novliberalaj kontraŭlaboristaj politikoj de la registaro sub Volodymyr Zelenskij. Tiuj politikoj subfosas la socie larĝe bazitan defendon kontraŭ la rusia okupacio, kaj faras socie justan kaj ekologie daŭripovan rekonstruon neebla.

6. Ni staras solidare kun la kontraŭmilita movado, demokratia opozicio kaj sendependaj laboristaj luktoj en Rusio. Ni staras ankaŭ solidare kun la subpremataj naciecoj en Rusio, kiuj suferas aparte akute pro la milito kaj batalas por sia memdetermino. Ĝuste ilian junularon eluzas la Putin-reĝimo kiel kanonfuraĝon. Tiuj movadoj estas ŝlosila faktoro por atingi justan pacon kaj demokratian Rusion.

7. Rusio malliberigis multnombrajn homojn el Ukrainio kiel politikajn malliberulojn. Multaj estis kondamnitaj je jardekoj en malliberejaj kaj punaj barakaroj. Ni postulas ilian senkondiĉan liberigon. Ni postulas, ke la Internacia Ruĝa Kruco rajtu funkciigi regulan kontakton kun ĉiuj militkaptitoj. La interŝanĝo kaj liberigo de militkaptitoj estas antaŭpremiso por ia ajn justa paco.

8. Rusio devas pagi reparaciojn al la ukraina popolo. La oligarkoj de Rusio kaj Ukrainio devas esti senproprietigitaj. Iliaj havaĵoj devas esti disponigitaj por la rekonstruo de Ukrainio kaj post la falo de la Putin-reĝimo por la demokratia evoluo de Rusio.

9. Ni postulas, ke la “okcidentaj” registaroj tuj nuligu la ŝuldojn de Ukrainio. Tio estas krite grava kondiĉo por la suverena rekonstruo de la lando. La riĉaj ŝtatoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko devas establi multinkluzivajn kaj larĝe bazitajn subtenprogramojn por la ukraina popolo kaj la rekonstruo de la lando. Tiu rekonstruo devas okazi sub la demokratia rego de la loĝantaro, sindikatoj, naturmediaj iniciatoj, feminismaj organizaĵoj kaj organizitaj kvartaloj en la urboj kaj vilaĝoj.

10. Ni kontraŭas ĉiujn projektojn de la eŭropaj kaj nordamerikaj registaroj, kaj ankaŭ de internaciaj organizaĵoj, kiuj celas trudi novliberalan ekonomian agendon al la ukraina popolo. Tio plilongigus kaj profundigus la malriĉecon kaj suferadon. Ni denuncas ankaŭ ĉiujn provojn forvendi la propraĵon kaj valoraĵojn de la ukraina loĝantaro al eksterlandaj entreprenoj. La resaniĝo kaj reorganizo de la agrikulturo, industrio, energisistemoj kaj la tuta socia infrastrukturo devas servi por la soci-ekologia transformiĝo de Ukrainio, ne por la liverado de malmultekosta laborforto, greno kaj hidrogeno al okcidenteŭropaj landoj.

11. Efika milita subteno al Ukrainio ne postulas novan ondon de armado. Ni kontraŭas la rearmiĝajn programojn de NATO kaj armileksportojn al triaj landoj. Anstataŭe, la landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko provizu el siaj ekzistantaj gigantaj arsenaloj la armilojn, kiuj helpu Ukrainion defendi sin efike. Tiusence ni postulas, ke la armilindustrio ne servu la profitinteresojn de la kapitalo – male, ni volas labori en la direkto de socia alproprigo de la armilindustrio. Tiu industrio devus servi la tujajn interesojn de Ukrainio. Samtempe, pro sociaj kaj urĝaj ekologiaj kialoj ni substrekas la neprecon de demokratia konverto de la armila industrio al socie utila produktado je tutmonda skalo.

12. Ni volas iniciati debaton pri radikala reorganizo de Eŭropo. Ni volas kontribui al evoluigo de komuna eŭropa perspektivo por radikalaj soci-ekologiaj reformoj kaj fine por fundamenta eko-socialisma transformo de la tuta eŭropa kontinento en tutmonda solidareco. Ene de tiu kadro ni subtenas la volon de la ukraina popolo aliĝi al la EU, kvankam ni malakceptas la novliberalajn fundamentojn de la EU, kiuj malriĉigas milionojn da homoj kaj antaŭenigas neegalan evoluon en Eŭropo. Ni alprenas la perspektivon, ke aliro de pluraj landoj en Orienta Eŭropo estas okazo por kune reflekti pri tio, kiel eblas iniciati tian radikalan soci-ekologian ŝanĝon tra la tuta Eŭropo, kiu inkluzivos komunan energio-strategion, ekologian industrio-konverton, pensio-sistemojn bazitajn sur kurantaj enpagoj, socian reguladon de laboro, solidarecbazitan migropolitikon, interregionajn egaligajn transpagojn, kaj militsekurecon kune kun konverto de la armila industrio. Sindikataj, feminismaj, ekologiaj, kontraŭaŭtoritatisme maldekstraj kaj socialismaj fortoj en Orienta Eŭropo devus grave roli en ĉi tiu debato.

Ĉi tiun debaton kune lanĉis Socialnji Ruĥ [Socia Movado] en Ukrainio, Posle Media Collective [Komunikila Kolektivo Posle] en Rusio, Bewegung für den Sozialismus / Mouvement pour le Socialisme [Movado por Socialismo] kaj solidaritéS – mouvement anticapitaliste, féministe, écosocialiste [Solidarecoj – kontraŭkapitalisma, feminisma, ekosocialisma movado] en Svisio, emanzipation – Zeitschrift für ökosozialistische Strategie (DE, AT, CH), 2024-06-04.

Ni invitas ĉiujn interesitajn organizaĵojn, grupojn, iniciatojn kaj amaskomunikilajn kolektivojn disvastigi kaj subskribi ĉi tiun deklaracion ĝis la 14-a de junio. Bv. sendi konfirmon pri via subskribo al to: Joao_Woyzeck@proton.me and redaktion@emanzipation.org
Individuoj bonvolu subskribi ĉi tie: https://forms.gle/EAPYSoJCHpWq4bHR6